

KATOLIKA SENTO

Periodico dell'Unione Esperantista Cattolica Italiana (UECI)

www.ueci.it

"Per la promozione della fratellanza e della comprensione tra i vari popoli di diverse lingue" (Paolo VI)

Periodico bimestrale - Reg. trib. di Vercelli 22.12.1997 n. 306 -
Sped. in abb.post. art. 2 comma 20/c L662/96 - filiale di Vercelli -
Direttore resp.: Mons. Gianni Ambrosio - Dir. e amm.: Vercelli, via Benadir, 62
stampato da **arena.net** - Grignone di Zocco (VI)

Anno 94 - n. 3
MAGGIO-GIUGNO 2015

MAJO: MARIA MONATO

Nell'anno in cui si celebra il 200° anniversario della nascita di San Giovanni Bosco pubblichiamo parte di un suo discorso del 20 maggio 1877 (giorno di Pentecoste) in occasione della novena di Maria SS. Ausiliatrice.

Siamo nella festa di Pentecoste, nella novena di Maria SS. Ausiliatrice. In questo mese si ottengono non una sola, ma molte grazie ogni giorno dalla Madonna. Ora sono persone che vengono esse stesse qui in questa nostra Chiesa a chiedere favori o a ringraziare per quelli ricevuti; ora ci giungono da lontano lettere e relazioni di fatti mirabili, attribuiti all'invocazione della nostra buona Madre; ed esprimenti la gratitudine dei beneficiati.

Ma le grazie più strepitose sono quelle che non sono conosciute. Quante e quante persone per intercessione di Maria Santissima poterono mettere in sesto le cose dell'anima loro! E anche senza andare molto

En la jaro, en kiu oni memoras la 200.an datrevenon de la naskiĝo de Sankta Johano Bosco, ni diskonigas parton de lia parolado de la 23an de Majo 1877 (Pentekosta tago) okaze de la tagoko honore de la Plejsankta Maria la Helpantino.

Ni estas en la festo de Pentekosto, en la tagoko de la Plejsankta Maria la Helpantino. En ĉi tiu monato, ĉiutage, oni akiras ne nur unu, sed multajn favorojn de la Madono. Nun estas homoj, kiuj venas mem en ĉi tiu nia Preĝejo por elpeti favorojn aŭ danki pro tiuj ricevitaĵoj; nun alvenas de malproksime leteroj kaj raportoj pri mirindaĵoj, atribuitaj al la preĝpetoj al nia bona Patrino, kaj esprimantaj la dankemon de la helpitoj.

Sed la plej sensaciaĵoj estas tiuj nekonataj. Kiom kaj kiom da personoj, pro la propetado de Maria la Plejsankta, povis reordigi la aferojn de sia animo! Kaj, ankaŭ sen iri tro malproksimen, ĉi



lontano, qui nella nostra casa sono innumerevoli le grazie che ci furono e si vanno facendo in favore di tanti giovani, che invocando Maria sotto questo titolo di *Auxilium Christianorum* [Aiuto dei Cristiani], potranno ottenere grazie spirituali. Chi riuscì a perdere qualche cattiva abitudine, chi ad acquistare qualche virtù difficile a praticarsi...

Mi raccomando adunque quanto so e posso, che ciascuno preghi Maria Santissima in questa novena. Questa Madre pietosa concede facilmente le grazie di cui abbisogniamo, e tanto più le spirituali. Essa in cielo è potentissima, e qualunque grazia domandi al suo Divin Figliuolo, le è subito concessa. La Chiesa ci fa conoscere la potenza e la benignità di Maria con quell'inno che incomincia: *Si caeli quaeris ianuas, Mariae nomen invoca* [Se cerchi le porte del cielo, invoca il nome di Maria]. Se per entrare in paradiso basta invocare il nome di Maria, bisogna pur dirlo che Ella sia potente. Il solo suo nome è rappresentato come porta del cielo, e tutti quelli che vogliono entrarvi, debbono raccomandarsi a Maria.

E noi ricorriamo a lei, specialmente perché ci aiuti nel punto della morte. La Chiesa infatti in altro luogo dice che Maria da sola è terribile come un esercito ordinato a battaglia che pugna contro i nemici dell'anima nostra.

tie, en nia domo, estas nenombreblaj la favoroj, kiuj estis kaj estas farataj favore de multaj junuloj, kiuj, alvokante Marian sub la titolo de *Auxilium Christianorum* [Helpantino de la Kristanoj], povis akiri spiritajn gracojn. Iuj sukcesis perdi kelkajn malbonajn kutimojn, aliaj akiri kelkajn virtojn malfacile praktikeblajn...

Pro tio mi rekomendas al vi – kiom estas al mi plejeble – ke ĉiu preĝu Marian la Plej-sanktan en ĉi tiu tagoko. Tiu ĉi kompatema Patrino facile disdonas la favorojn, kiujn ni bezonas, kaj pleje tiujn spiritajn. Ŝi en la ĉielo estas tre potenca, kaj kian ajn favoron ŝi demandas al sia Dia Filo, tuj ĝi estas al ŝi donata. La Eklezio konigas al ni la potencon kaj la bonkorecon de Maria per tiu himno kiu komenciĝas tiele: *Si caeli quaeris ianuas, Mariae nomen invocas* [Se vi serĉas la pordon de la ĉielo, alvoku la nomon de Maria]. Se per eniri la paradizon, sufiĉas alvoki la nomon de Maria, oni devas agnoski, ke Ŝi estas potenca. Nur ŝia nomo simbolas la pordon de la ĉielo, kaj ĉiuj, kiuj volas eniri, devas sin rekomendi al Maria.

Kaj ni turniĝu al ŝi precipe, por ke ŝi helpu nin en la horo de la morto. La Eklezio, fakte, aliloke, diras, ke Maria sole estas terura kiel armeo ordigita por batali kontraŭ la malamikoj de nia animo.



— “mi NE estas Charlie” —

Artikolo de Giuseppe Ardigò el la pres-agentejo [Zenit.org](http://www.zenit.org)
de la 12a de Januaro 2015. Resume tradukis Ida Bossi

Riassunto: Pur disapprovando l'attentato di Parigi del 7 gennajo scorso contro i vignettisti della rivista satirica “Charlie Ebdò”, l'autore non condivide la slogan “*Je suis Charlie*” (io sono Charlie) se ciò significa condividere le offese e le volgarità abitualmente espresse da quella pubblicazione in riferimento tutto ciò che è sacro, per cui fa suo lo slogan opposto: “*Je NE suis pas Charlie*” (io non sono Charlie).

(Il testo originale è leggibile qui : <http://www.zenit.org/it/articles/mi-spiace-ma-io-non-sono-charlie>)



Kvankam malaprobante la Parizan atencon kaj ĉiun formon de perforto “en la nomo de Dio”, se aliĝi al la slogano “*Je suis Charlie*” (mi estas Charlie) signifas kune aprobi la ofendojn kaj la vulgariĝojn de la sanktaĵo, tial “*Je NE suis pas Charlie*” (mi NE estas Charlie).

Ĉio, kio okazis en Parizo komence de la nova jaro, estas granda vundo en la historio de la homaro.

Ankoraŭ unufoje la principo de la sankteco de la vivo estis piedpremita kaj insultita, precipe ĉar oni faris tion “en la nomo de Dio”. La vivo estas donaco, kiun ni ricevis senpete. Kiu rajtas malestimi ĝin? La ordono de la Sinjoro, morala leĝo gravurita en la homa koro, estas klara kaj nedubebla: *Ne mortigu*.

Okaze de ĉi tiu lasta buĉado, ĉiu kristano preĝas hororigita por la viktimoj kaj iliaj familioj, sed li ne povas fari alie ol invoki ankaŭ la mizerikordon de Dio por la ekzekutistoj, viktimoj de ia kulturo kaj de edukado al perforto, de ia *forma mentis* distordigita de la religia fanatikeco.

Granda parto de la nuntempa socio, socio frukto de la klerisma raciismo inspiriganta el la Libereco, ne konscias, ke ofte ĝuste ĉi tiu estas misinterpretata. Ĝi fariĝas esprimo de la relativismo kaj de la nuntempa religia sinkretismo, kiuj naskis pezajn formojn de senindulgo koncerne la eksteraj signoj de ĉia religia esprimo.

En tia scenejo mi min demandas: ĉu estas laŭleĝe permesi al si la liberon profani la sanktaĵojn? Ĉu mi povas, en la nomo de “mia” libereco insulti

la alian por “trudi” perforte la principon de la laikeco? Oni ĉiam instruis min, ke la propra libereco *finiĝas* tie, kie *komenciĝas* tiu de mia proksimumo, kaj ke la insulto estas grava ofendo al la integreco de la persono.

La vinjetoj de Charlie Hebdo vere profanas ĉiujn religiajn kredojn, kaj mi sentas min – kiel katoliko – tre iritita vidante ridindigitaj miajn religiajn principojn. Tio, kio pleje ĝenas min, estas la konstato, ke neniuj indigniĝas, precipe la eklezia Institucio. Jen kial mi sentas la devon esprimi mian malaprobkon kaj la devon ne rekoni min en la entuziasmigama amasa krio “*Je suis Charlie*”. Libereco ne povas ekzisti sen la vero.

Estas la vero, kiu faras nin liberaj kaj ne la malo. Utiligi la satiron por ofendi la senton kaj la kulton de la sankteco estas kontraŭ ĉiu principo de libereco, kaj ĝi ofendas kaj ridindigas la veron, en kiu milionoj da personoj kredas.

La vinjeto, kiu malsanktigas la Madonon montrante ŝin kun dismalfermitaj gamboj, dum ŝi naskas la infanon, ne amuzas min kaj ankaŭ la “saturan”, vulgaran bildon pri la Mistero de la Triunuo.

Ĉi tiu ne estas satiro, ĝi estas insulto, primoko, blasfemo kaj sufiĉe.

Se aliĝi al la slogano “*Je suis Charlie*” signifas aprobi la ofendojn kaj la vulgarecon koncerne al la sanktaĵo, *Je ne suis pas Charlie*. Mi esperas, ke la venontaj eldonoj de la revuo kaj “la falango de Charlie” naskita post la granda marŝado en Parizo estos pli respektemaj pri la religiaj valoroj kaj pri la digneco de la personoj, kiu kredas en ili forlasante la vojon de la blasfemo kaj de la vulgareco. Mi ĉefe esperas, ke neniuj aŭdacoj iam plu “rompi la kraĵojn” en la nomo de la respektemo.

EL LA HOMILIOJ DE MONS. BALCONI

Okaze de Pentekosto, ni transkribas ĉi sube la homilion de nia eklezia asistanto eldirita por la Soleno de Pentekosto dum la S-akta Meso de la 18-an de Majo 2013.

La Sankta Spirito ne plu estas la elstara nekonato. Multe da movadoj strebas por konigi lin: la Pentekostanoj, la Renovigo en la Sankta Spirito, la Karismuloj. Multaj preĝas al li komence de sia preĝado, de sia la tago, de siajn farojn.

Dum la lasta konklavo la ĵurnalistoj klopodis diveni la nomon de la nova Papo. La Sankta Spirito montriĝis indiferenta antaŭ la prognozoj. Estas li, kiu elektas la posteulon de Petro, ankaŭ kiam li elektas iun alveninta el la fino de la mondo.

Al ni pastroj okazas vidi la vivigan agadon de la Spirito. Ĉe ni iuj sin konfesas en misteraj cirkonstancoj. Kiu naskis en ili la deziron purigi sian konsciencon? kaj komenci gravan vojon laŭ la Evangelio?

Mi miras la ĉeeston de la graco. Junulinoj magistriĝintaj *summa kun laŭde* deziras eniri klaŭzuran monaĥejon; ili volas sin konsekri al la Sinjoro. La Biblio estas vera: “Mi donos al vi koron novan, kaj spiriton novan mi metos en vi”.

La Sankta Spirito naskas la sanktulojn.

Estas proksima la beat-proklamo de Rolando Rivi, junulo dek-kvarjara, kiu atestis per sia vivo la fidon kaj la amon al Jesuo. Li estis seminariano, li ĝoje vestis la sacerdotan robon. Li diris: mi estas de Jesuo; kaj la vesto estis signo videbla de lia aparteno al la Sinjoro. Antaŭ mortigi lin, oni enfermis lin en porkejo, oni forŝiris al li la pastran veston, kvaŭ ili volus detrui lian identecon; oni frapis

lin per rimenfrapoj, lin torturis, lin vangobatis, lin humiligis. Li petis kompaton kaj ili ne aŭdis. Mi estas de Jesuo, li daŭre ripetis. [...]

La Biblio pri la Sankta Spirito uzas la metaforon de la akvo. La Sankta Spirito estas fonto de akvo sensoifiganta. Jesuo tion promesas al la Samarianino: kiu trinkas el la akvo, kiun mi donas al li, tiu neniam plu soifos.



Ni estas gvidataj de la Spirito de Jesuo. Lumigitaj de lia Spirito, ni serĉas la veron pelitaj de li.

La vero, skribis Muzil, ne estas peza ŝtono, kiun oni enpoŝigas; la vero estas kiel la maro, la oceano. Oni en ĝi mergiĝas, la ŝipo eknavigas, venkas la ondojn; kaj trairas la maron ĝis la elektita insulo. [...]

En la letero al la Romanoj la apostolo Paŭlo skribas: la amo de Dio estas verŝata en niajn korojn per la Sankta Spirito, donita al ni.

Ni povas reale ami Jesuon per tuta nia koro; ni povas rigardi kun la okuloj de Jesuo, vivi la vivon kun lia libereco, kun lia entuziasmo, kun lia spiriteco.

El ĉi tie la fruktoj, kiujn ni devus produkti kaj kolekti!

La Sinjoro ne demandas nin: ĉu vi estis kiel Moseo? ĉu vi estis kiel Abram? kial vi ne imitis Moseon? kial vi ne imitis Abramon?

Li al ni petos: ĉu vi estis vi mem? ĉu vi realigis la donacojn de la Sankta Spirito, kiujn mi semis en via koro? kiuj estas ĉi tiaj donacoj? kiuj estas viaj fruktoj?

(desegno de pastro Sebastiano Jervolino)



MALFERMITAJ AL LA TUTA MONDO

Rubriko zorge de frato Pierluigi Svaldi

NON RUBARE


Soprattutto in tempo di crisi desideriamo procurarci tutto quello che riteniamo utile. Pur consapevoli di essere venuti in questo mondo trovando tutto come un'opportunità, ci scopriamo spesso pieni di pretese, desiderando avere quello che è degli altri. In più, per avere un po' di potere, di profitto o di carriera arriviamo a vendere anche un po' della nostra dignità e onestà.

Pietro Metastasio scrive un aforisma che non riscontra tanti approfondimenti, soprattutto oggi:

*Dovunque il guardo giro,
immenso Dio, ti vedo:
nell'opre tue t'ammiro,
ti riconosco in me.*

Un aforisma che fa a pugno con il nostro vivere quotidiano. Se oggi giriamo lo sguardo, i nostri occhi vedono ovunque un ambiente di mercato, dove tutto si compra e si vende, dove tutto viene misurato con il denaro. Allora risulta addirittura provvidenziale il settimo comandamento: «*Non rubare*» (Es. 20, 14). Un comando espresso senza sconti: non si deve rubare mai, non mercanteggiare proprio tutto, perché ci sono valori non negoziabili.

Di contro il comando ci invita a ritagliarci degli spazi dove non si fa mercato. Nel campo della religione e della fede non ci sono acquisti da fare, anche se qualcuno li considera. Nei confronti di Dio non si dovrebbe adottare la legge della negoziazione o la logica del baratto, anche se pensiamo di



P. Metastasio

NE ȘTELU

Precipe en kriza tempo ni deziras havigi al ni ĉion, kion ni taksas utila. Eĉ se ni konscias, ke ni alvenis en tiun ĉi mondon trovante ĉion oportuna, ofte ni malkovras nin plenplenaj je pretendoj, dezirante havi tion, kio apartenas al aliaj. Aldone, por havi ioman povon, ioman profiton aŭ karieron ni aŭdacas vendi eĉ iom de nia digno kaj honesteco.

Petro Metastasio skribas aforismon, kiu ne kolektas multajn pliprofundigojn, ĉefe hodiaŭ:

*Kien ajn mi turniĝas,
senlima Di', vin vidas:
mi viajn verkojn miras,
rekonas vin en mi.*

Temas pri aforismo, kiu akre kontraŭstaras nian ĉiutagan vivon. Se ni hodiaŭ turnas nian rigardon ĉirkaŭen, niaj okuloj vidas ĉie ajn merkatan medion, kie ĉion oni aĉetas kaj vendas, kie ĉio estas mezurata per mono. Tiam montriĝas vere providenca la sepa ordono: «*Ne ŝtelu*» (Eli 20, 14). Ordono esprimata sen rabatoj: oni devas neniam ŝteli, ne primarĉand absolute pri ĉio, ĉar estas valoroj neprinegoceblaj.

Aliflanke la ordono invitas nin teni por ni kelkajn ne-negocajn spacojn. En la kampo de la religio kaj de la fido ne estas farendaj aĉetoj, ankaŭ se kelkaj homoj pri-konsideras ilin. Rilate al Dio oni ne devus adopti la leĝon de la negocado aŭ la logikon de la interŝanĝo, ankaŭ se ni

dare qualcosa a Dio perché lui dia qualcosa a noi. Anche l'essere umano e l'intero creato non dovrebbero essere sottomessi alle regole del mercato in quanto valgono più del denaro. Infatti il rischio di profanare l'uomo, soprattutto se povero, è molto grande. Solo l'uomo ha il compito di custodire nel mondo il fuoco della speranza e della libertà, la logica del dono, l'atto materno del dare.

Quando prevale la logica del profitto, allora il mondo ritorna al caos primordiale e viene meno la speranza di un mondo migliore. Quando la gente si impadronisce delle cose e delle persone, allora manifesta la paura di non avere abbastanza e fa crescere la paura della morte, coinvolgendo gli altri nel suo dramma. L'uomo povero invece riconosce di ricevere tutto da Dio e ci insegna a vivere nel rispetto di ogni cosa, restituendo tutto a Dio con gratitudine. Ricevendo ogni giorno possibilità spirituali, intellettive e tecniche, accogliendo cose e persone come un dono e come un'opportunità ulteriore, l'uomo può esprimere tutta la sua gratitudine e il consenso a collaborare in modo attento e vivace.

Il comando di «*non rubare*» sta ad indicare il limite oltre il quale tutto viene compromesso. La misura più congeniale all'uomo per una vita piena ci viene data da Gesù stesso quando dice ai suoi discepoli: «*Poiché avete ricevuto gratuitamente, gratuitamente date*» (Mt. 10, 8).

Allora la nostra vera vocazione è quella di non sacrificare niente di personale sull'altare del denaro e di offrire all'umanità quello che abbiamo ricevuto in modo inaspettato e gratuito. Donare con gioia all'umanità di oggi una lingua che faciliti la comprensione fra tutti significa anche essere riconoscenti a Dio del dono ricevuto con sorpresa.

pensas doni ion al Dio, por ke li donu ion al ni. Ankaŭ la homo kaj la tuta kreitaĵo ne devus esti submetitaj al la reguloj de la merkato, ĉar ili valoras pli ol la mono. Fakte la risko profani la homon, precipe se malriĉan, estas tre granda. Nur la homo havas la rolon gardi, en la mondo, la fajron de la espero kaj de la libereco, la logikon de la donaco, la patrinan don-agon.

Kiam venkas la logiko de la profito, tiam la mondo denove iĝas praĥaosa kaj malkreskas la espero al pli bona mondo. Kiam la homoj havigas al si la aĵojn kaj la personojn, ili montras la timon ne sufiĉe posedi, kaj ili kreskigas la timon antaŭ la morto, implikante la aliajn en sian dramon. La malriĉa homo male, agnoskas, ke li ricevas ĉion de Dio, kaj li instruas nin kiel vivi respektante ĉion kaj dankeme redonante ĉion al Dio. Ricevante ĉiutage spiritajn, intelektajn kaj teknikajn eblecojn, akceptante aĵojn kaj personojn kiel donacojn kaj kiel pluan oportunecon, la homo povas esprimi tiel sian tutan dankemon kaj sian konsenton kunlabori atente kaj verve.

La ordono «*ne ŝtelu*» indikas la limon transe de kiu, ĉio estas endanĝerigita. La juĝmezuro plej adekvata al la homo por plenplena vivo estas al ni donata de Jesuo mem, kiam li diras al siaj disĉiploj: «*Ĉar donace vi ricevis, donace donu*» (Mateo 10, 8).

Tiam nia vera alvoko estas, ke ni forferu nenion personan sur la altaro de la mono, kaj ke ni donu al la homaro tion, kion ni ricevis neatendite kaj donace. Ĝoje doni al la hodiaŭa homaro lingvon, kiu faciligas la komprenon inter ĉiuj homoj, signifas ankaŭ, ke ni estas dankemaj al Dio pro la donaco surprize ricevita.

Dirite inter ni ...



037

BESTOJ

- Ĉu ni parolu pri bestoj?
- Volonte.
- Ĉu vi konas multajn bestojn?
- Neniam mi kalkulis kiom da bestojn mi konas.
- Kelkajn vi certe konas.
- Ha, jes, kelkajn mi konas.
- Ekzemple?
- Mi volus komenci menciante tiun, kiun mi plej bone konas, sed...
- Nu, kuraĝu!
- Ĉu vere mi diru?
- Jes, certe.
- Bone, mi diru, ke la plej granda besto, kiun mi konas estas... vi.
- Mi devis atendi ĉi tiun ŝercon.
- Por komenci.
- Ĉar la dua estas vi.
- Nu, ni estu seriozaj: ĉirkaŭ mi estas multaj hundoj.
- Ha, jes, kiam oni iras laŭ la stratoj, oni vidas multajn hundojn.
- Sed oni vidas ankaŭ multajn katojn.
- La katoj, generale, vivas en la domoj.
- Ne nur, ili vivas ĉie.
- Ekzemple, multaj katoj vivas en la tombejoj.
- Ili vivas en la parkoj.
- Ili vivas ekster la domoj.
- Mi vidis katojn en la arbaroj.
- Jes, ili adaptiĝas tre facile al la ĉirkaŭaĵo.
- Kaj ili ĉiam trovas ion por mangi.
- Ni precizigu, ke en la tombejoj ili manĝas tion, kion portas al ili homoj de bona volo.

ANIMALI

- Parliamo di animali?
- Volentieri.
- Conosci molti animali?
- Non ho mai calcolato quanti animali conosco.
- Ne conosci certamente alcuni.
- Ah, sì, alcuni li conosco.
- Ad esempio?
- Vorrei cominciare nominando quello che conosco meglio, ma...
- Su, abbi coraggio!
- Devo dirlo veramente?
- Sì, certo.
- Bene, devo dire, che la più grande bestia che conosco sei... tu.
- Dovevo attendermi questo scherzo.
- Per cominciare.
- Perché la seconda sei tu.
- Bene, siamo seri: attorno a me ci sono molti cani.
- Ah, sì, quando si va lungo le strade si vedono molti cani.
- Ma si vedono anche molti gatti.
- I gatti, in generale, vivono nelle case.
- Non soltanto, vivono dappertutto.
- Ad esempio, molti gatti vivono nei cimiteri.
- Vivono nei parchi.
- Vivono fuori dalle case.
- Ho visto dei gatti nei boschi.
- Sì, si adattano molto facilmente a ciò che li circonda.
- E trovano sempre qualcosa da mangiare.
- Precisiamo che nei cimiteri mangiano ciò, che portano loro delle persone di buona volontà.

- Sed ĉirkaŭ ni ne estas nur katoj kaj hundoj.
- Vi pravas: en niaj hejmoj estas kutime aliaj bestoj.
- Fiŝoj kaj birdoj estas tre oftaj.
- Ĉefe la birdoj.
- Multaj posedas kanto-birdojn.
- Kanarioj, ekzemple.
- Ili kantas la tutan jaron, se ili estas bone zorgataj.
- Temas pri birdoj, kiuj de jarcentoj vivas en kaĝoj .
- Ili eĉ naskas birdidojn.
- Kelkfoje okazas.
- Sed ankaŭ la fiŝoj , kiuj vivas en belaj kuvoj kun kuranta akvo, estas tre ŝatataj.
- Jes, estas bele vidi en la akvo daŭran koloro-moviĝon.
- Kelkaj posedas testudojn.
- Aliaj havas simiojn.
- Nekutimaj estas la serpentoj.
- Sed kelkaj vivas kun ili.
- Kaj la hamstroj?
- Ĉiam movigemaj, ili estas amuzo por la infanoj.
- Ne estas amuzaj la muŝoj .
- Nek la vespoj.
- Nek la kampaj cimoj.
- Jes, multaj insektoj eniras niajn domojn.
- Dum la varma sezono oni devas sin defendi de la kuloj.
- Ha, tiuj estas danĝeraj.
- Kelkfoje oni trovas belan araneaĵon.
- Ĝenerale, la araneoj estas simpatiaj.
- Dependas de la homoj.
- Kaj de la araneoj.
- Mi ne pensis, ke jam en nia hejmo estas tiom multe da bestoj.
- Vi devas ami viajn similulojn.
- Ma attorno a noi non ci sono solo gatti e cani.
- Hai ragione: nelle nostre case ci sono di solito altri animali.
- Pesci ed uccelli son molto usuali.
- Specialmente gli uccelli.
- Molti hanno degli uccelli da canto.
- Canarini, ad esempio.
- Cantano tutto l'anno, se sono ben curati.
- Si tratta di uccelli che da centinaia di anni vivono nelle gabbie.
- Generano persino degli uccellini.
- Qualche volta succede.
- Ma anche i pesci, che vivono in belle vasche con acqua corrente, sono molto apprezzati.
- Sì, è bello vedere nell'acqua un continuo muoversi di colori.
- Alcuni hanno delle tartarughe.
- Altri hanno delle scimmie.
- Inusuali sono i serpenti.
- Ma alcuni vivono con loro.
- E i criceti?
- Sempre in movimento, sono un divertimento per i bambini.
- Non sono divertenti le mosche.
- Neanche le vespe.
- Né le cimici di campagna.
- Sì, molti insetti entrano nelle nostre case.
- Durante la stagione calda ci si deve difendere dalle zanzare.
- Ah, quelle sono pericolose.
- Alle volte si trova una bella ragnatela.
- Generalmente i ragni sono simpatici.
- Dipende dagli uomini.
- E dai ragni.
- Non pensavo che già a casa nostra ci fossero tante bestie.
- Devi amare i tuoi simili.




FLOROJ

- Bonan tagon.
- Bonan tagon.
- Kion vi havas tie?
- Ho, estas florbukedeto.
- Kie vi prenis ilin?
- Mi estis en la kamparo.
- Belege, ĉu vi trovis multajn florojn?
- Certe, rigardu!
- Kiaj koloroj!
- Ho jes, en ĉi tiu sezono la floroj havas belegajn kolorojn.
- Sed mi ne vidas primolojn.
- Mi ilin ne trovis.
- Eble ili jam forvelkis: ili estas inter la unuaj floroj de la sezono.
- Jes, kune kun la krokusoj.
- Kaj la neĝofloroj?
- Ankaŭ tiuj ne estas en mia bukedeto.
- Sed mi vidas violojn.
- Tiujn mi ŝatas.
- Kaj estas ankaŭ lekantoj.
- Jes, estas lekantoj flavaj kaj etaj blankaj lekantetoj.
- Kaj jen aliaj etaj floroj, la miozotoj.
- Ho, jes, miozotoj, la ne-forgesu-min-oj, tradukante la italan nomon.
- Ĉi tiuj ja ne estas florvarmejoj floroj.
- Ne, ĉi tiuj estas etaj, senpretendaj floretoj.
- Kiam mi iras al florvarmejo, tiam mi elektas aliajn florojn.
- Ĉar estas la ebleco tion fari.
- Jes, kiam prezentiĝas la ebleco, oni devas profiti.
- Oni ekzemple povas aĉeti rozojn

FIORI

- Buon giorno.
- Buon giorno.
- Cos'hai lì?
- Oh, è un mazzetto di fiori.
- Dove li hai presi?
- Ero in campagna.
- Bellissimo, hai trovato molti fiori?
- Certamente, guarda!
- Che colori!
- Oh, sì, in questa stagione i fiori hanno dei bellissimi colori.
- Ma non vedo le primule.
- Non le ho trovate.
- Forse sono già appassite: sono fra i primi fiori della stagione,
- Sì. insieme con i crocus.
- Ed i bucaneeve?
- Anche quelli non ci sono nel mio mazzetto.
- Ma vedo delle viole.
- Quelle mi piacciono.
- E ci sono anche delle margherite.
- Sì, ci sono delle margherite gialle e piccole margherite bianche.
- Ed ecco altri piccoli fiori, i non ti scordar di me.
- Oh, sì, i non-ti-scordar-di-me, i “ne-forgesu-min-oj”, traducendo il nome dall’italiano.
- Questi di sicuro non sono fiori di serra.
- No, questi sono piccoli fiorellini senza pretese.
- Quando vado in serra, allora scelgo altri fiori.
- Perché c'è la possibilità di far ciò.
- Sì, quando si presenta l'occasione, allora si deve approfittare.
- Ad esempio si possono comperare

- ĉiukolorajn.
- La plej belaj estas la ruĝaj .
 - Dependas, iuj ŝatas la blankajn.
 - Kaj aliaj la flavajn.
 - Sed belaj estas ankaŭ la roz-koloraj.
 - Laŭ la nomo ĉiuj rozoj devus esti roz-koloraj.
 - Tamen, de kelkaj jaroj ekzistas ankaŭ bluaj rozoj.
 - Kaj ili havas belegan, intensan koloron.
 - Nu, mi opinias, ke kun la rosoj oni faris milojn da eksperimentoj.
 - Eble ekzistas ankaŭ rozo “Esperanto”.
 - Pri tio estu certa.
 - Sed en la fiorkultivejoj oni trovas ankaŭ multajn aliajn specojn de floroj.
 - Por ĝojigi la vivon.
 - Ekzemple la orkideoj.
 - Nu, ĝenerale tiuj estas tro seriozaj floroj por ĝojigi la vivon.
 - Tamen...
 - Belaj floroj estas ankaŭ lilioj.
 - Kaj hiacintoj.
 - Kaj gladioloj.
 - Kaj visterioj.
 - Kial ne pensi pri la frukto-arboj?
- Ho, la spektaklo, kiun oni vidas dum ĉi tiu periodo estas vere mirinda.
- Jes, sed oni devas nur rigardi ĝin.
 - Kial?
 - Provu depreni la florojn de tiuj arboj, kaj vi ne havos fruktojn.
 - Nu, oni devas forgesi la proverbon “pli bone ovo hodiaŭ ol kokino morgaŭ”, ĉar florojn oni ne manĝas.
- rose di tutti i colori.
- Le più belle sono le rosse.
 - Dipende, alcuni amano le bianche.
 - Ed altri le gialle.
 - Ma belle sono anche quelle color rosa.
 - Secondo il nome tutte le rose dovrebbero essere di color rosa.
 - Tuttavia da qualche anno esistono anche rose blu.
 - Ed hanno un bellissimo colore intenso.
 - Boh, credo che con le rose abbiano fatto migliaia di esperimenti.
 - Forse esiste anche la rosa “Esperanto”.
 - Di questo sii sicuro.
 - Ma nei luoghi dove si coltivano si trovano anche molte altre specie di fiori.
 - Per rendere gioiosa la vita.
 - Ad esempio, le orchidee.
 - Beh, in generale quelli sono fiori troppo seri per rendere gioiosa la vita.
 - Tuttavia...
 - Bei fiori sono anche i gigli.
 - E i giacinti.
 - E i gladioli.
 - E i glicini.
 - Perché non pensare agli alberi da frutto?
 - Ho, lo spettacolo che si vede in questo periodo e veramente meraviglioso.
 - Sì, ma si deve solamente guardarlo.
 - Perché?
 - Prova a prendere i fiori di quegli alberi e non avrai frutti.
 - Già, si deve dimenticare il proverbio “meglio un uovo oggi che una gallina domani”, perché i fiori non si mangiano.



Nia eta Parnaso

Rubrica dedicata alla Poesia

Rubriko dediĉita al Poezio

IL POETA

LA POETO

*È poeta
chi sa ascoltare
la voce dei silenzi,
il fluire della vita.*

*Solo di bellezza pago
veleggia nell'infinito*

*Imprigiona in una conchiglia
dell'oceano il canto,
il profumo in un fiore.*

*Antenna occulta nelle pieghe
del mistero,
coglie dei silenzi
i colori
degli spazi i suoni.*

*Medium della Musa
accende arcobaleni
di luce.*

*Estas poeto
kiu kapablas aŭskulti
la voĉon de l' silentoj,
la fluadon de la vivo.*

*Kontenta nur pri beleco
li velas en la senfino,*


*Li enprizonigas en konkon
de la oceano la kanton,
la parfumon en floron.*

*Anteno kaŝita en la faldoj
de la mistero,
li kaptas de la silentoj
la kolorojn
de la spacoj la sonojn.*

*Mediumo de la Muzo
li estigas ĉielarkojn
de lumo.*

(Anna Amorelli Gennaro)

(esperantigis Norma Cescotti)



Expo 2015 en Milano

Epoka ŝanĝiĝo aŭ multekosta reklamilo
(prikonsideroj de Ida Bossi)

Mi laboradis dum pli ol tridek jaroj en la socia kampo, sekve mi estis precipe kuntrenita en la disvolvo de subteneblajn projektojn en la hindaj kaj afrikaj vilaĝoj.

Mi ankaŭ fariĝis ĉiam pli konscia, ke nutri malsatajn kaj soifajn personojn kaj ankaŭ eduki ilin, estas la plej korekta maniero por pluteni bonajn, profundajn, pacajn rilatojn inter homoj el malsamaj landoj, sociaj niveloj kaj kulturoj.

Tamen, laŭ mi, nutri personon signifas ankaŭ doni zorgojn, tempon kaj amon.

Ĉio, kion mi kapablis fari ĝis nun, naskas el la espero konstrui pli bonan kaj justan mondon, la mondon, kiun ni ĉiuj deziras.

Do mi tre feliĉiĝis, kiam mi eksciis, ke la temo elektita por EXPO 2015 okazanta en Milano de la 1.a de Majo ĝis la 31.a de Oktobro, estas “Nutri la Planedon, Energio por la Vivo”.

Kvankam mi persone ne estos kuntrenita en la evento, mi atente sekvas la renkontiĝojn kaj la prelegojn.

La temo “Nutri la Planedon, Energio por la Vivo” plene alfrontos du gravajn problemojn de la tria jarmilo:

1.e - Krei kondiĉojn por sekurigi sufiĉan kaj korektan nutraĵon al ĉiuj.

2.e - Certigi subteneblecon al la delikata ekvilibro inter homaro kaj tero, akvo kaj aero.

Ĉiuj kvar vortoj (Nutri-Planedo-Energio-Vivo) donos la eblecon disvolvi ilian koncepton.

Pridiskutoj, renkontiĝoj kaj prelegoj evidencigos la gravecon de la novaj teknologioj, ekzemple, de la uzo de novaj biologiaj

teknikoj por produkti pli multe da nutraĵo, de la bredado de specialaj insektoj por nutri bestojn aŭ la eltiradon de grandaj kvantoj da natura gaso el skistaj rokoj por eviti la transformon de cerealoj en biogason, anstataŭ uzi ilin por nutri homojn kaj bestojn.

Tamen, ĉu novaj teknologioj helpas kaj sufiĉas por venki la malsaton en la mondo? Mi dubas, ke ĉi tio estos la solvo. Teknologioj certe helpas produkti pli da nutraĵo per pli racia kaj subtenebla maniero, sed, mi opinias, ke la celo havi pli justan distribuadon de nutraĵo kaj akvo estos havebla nur per reala, profunda ŝanĝo de la politiko kaj de la pensmaniero de la registaroj.

Ĉu Expo 2015 estos vere adekvata evento por stimuli kaj kuntreni ilin en tiu ĉi epokfaranta menso-ŝanĝo, kiun ni bezonas por plibonigi nian planedon?

Fundamentaj rimedoj de nia planedo devus esti je kompleta dispono de ĉiuj laŭ iliaj bezonoj. Profito ne devus esti la plej granda celo, kontraŭe, tio devus esti solidareco kaj komprenemo.

Antaŭ ne longe la milana episkopo, kardinalo Angelo Scola, alfrontante kaj renversante la temojn de EXPO 2015 proponis konsiderojn per sia demando: “Kio nutras la vivon?”.

La Kardinalo reproponas la Jesuajn vortojn: “Ne per nura pano vivas homo” (Lc 4,4) kaj kuraĝigas vivstilon, kiu permesas preterpasi la individualismon. La kristanoj, li diras, devas havi la kuraĝon proponi al la kredantoj kaj ne-kredantoj, la vivo-stilon de Kristo respektante la liberecon de ĉiuj.

Ankaŭ Papo Francisko en la *Evangelii Gaudium* uzas fortajn vortojn: “Disvastiĝas

la tutmondiĝo de la indiferenteco... ni fariĝas nekapablaj provi kompaton fronte de la dolora krio de la aliaj... La bonstato anestezas nin”

Ĉu ĉi tiu estas sonĝo? Ĉu ĉi tiu estas utopio? Mi esperas ke ne, sed estos tre longa irvojo por atingi ĝin.

Tre granda kvanto da mono estis investita por la Expo-a evento kaj – ne kredeble – laŭ ĝia rigidaj reguloj, Expo estas nur ses-mona-ta evento, kaj preskaŭ ĉio estos detruita je ĝia

fino. Reale nesubtenebla evento! Krome, laŭ la Expo-a manlibro, nek la decidoj nek la finaj raportoj estas antaŭvideblaj.

Tial mi demandas min mem, ĉu Expo restos nur ne difinita reklama evento por multaj nacioj? Nuntempe ni ne necesas grandajn paroladojn aŭ anoncojn. Ĉi tiu estas la tempo por bonaj kaj justaj decidoj kaj konkretaj faktoj.

La posteuloj prijuĝos!

Expo 2015: il padiglione del Vaticano



Il padiglione della Santa Sede è situato in posizione centrale, come il punto fermo attorno a cui ruotano le aree espositive delle altre nazioni.

Non si tratta della cappella dell'Expo. Sulle pareti esterne il messaggio è affidato a scritte leggere e sottili, in acciaio, poste sulla facciata e sulle pareti esterne con le parole **“non di solo pane”** e **“dacci oggi il nostro pane”**, tradotte in 13 lingue.

Nelle intenzioni della Santa Sede le lettere devono sembrare come piovute dal cielo perciò, più che l'acciaio, sarà l'ombra proiettata a consentirne la lettura. Ciò grazie ad una particolare inclinazione delle pareti, realizzata come se l'interno del padiglione avesse attirato a sé l'esterno.

L'architettura trae ispirazione da quella conventuale, dal chiostro. Se ne intuisce la forma dalla parete Nord, modellata da due sezioni di arcata, a tutto sesto e a sesto acuto, dalle quali emerge, come da una spaccatura della roccia, la vegetazione che cresce sul tetto.

Il padiglione della Santa Sede è uno dei più piccoli: la base è di 15 per 25 metri, alta 15. Ciò non significa banalità, ma rispetto del terreno, utilizzo di materiali semplici e poveri.

L'aspetto complessivo è quello di un blocco costituito da un unico materiale, alla cui soglia si trova una enorme vela gialla in tessuto che maschera l'ingresso, colora la luce e contribuisce a rendere la facciata simile alla bandiera Vaticana.

Riassunto da: http://www.expoholysee.org/pagine-9-progetto_architettonico

LA KVAR BIBLIAJ TAGOJ EN WROCLAW (PL)

De la 15a ĝis la 19a de aprilo 2015 okazis en Vroclavo la renkontiĝo pri la kvar Bibliaj Tagoj, kiun partoprenis 45 esperantistoj katolikaj, luteranaj kaj ortodoksaj el sep eŭropaj nacioj: Ĉeĥio (7), Germanio (12), Italio (3), Nederlando (1), Rumanio (2), Slovakio (2) kaj Pollando (18).

La tri Italoj: Francesca Trussardo, Norma Cescotti kaj Feliĉe Sorosina kunvenis en Trento, la 14an vespere, por ekveturi aŭte, la morgaŭan matenon kaj atingi la urbon Vroclavo post dek du horoj da veturado. Antaŭ la kunvenejo, la domo de la Fratinoj de Notre Dame, atendis nin Stefan Lepping kaj Teresa Pomorska, la ĉeforganizantoj de la kunveno. Post la vespermanĝo ĉiuj partoprenantoj kunigis en la salono de la domo por la interkona vespero, kie ili renkontis malnovajn geamikojn kaj ekkonis aliajn novajn.

Dum la tuta daŭro de la kunveno, ĉiu tago komenciĝis per Sankta Meso, sekvis la matenaj laŭdoj, la matenmanĝo kaj la prelego pri Apokalipso fare de pastro Willibald Kubingk, dividita laŭ tri partoj, unu potage. La prelego celis montri, ke la lasta libro de la Biblio, ne volas priskribi katastrofan mondfinon, sed kuraĝigi, ne nur la unuajn kristanojn, timantajn la finon de la mondo, sed la ĉiutempajn homojn, por ke ili plutenu la fidon kaj de la esperon, ne deturniĝante de Jesuo Kristo, la sola venkinto kontraŭ la malbono kaj la morto. Al ĉiu prelego sekvis kantoj el libro Adoru kun gitara akompano de Stefan Lepping. Ĉiu vespero finiĝis per vesproj kaj kantoj.

Ĵaŭdon, la 16an, posttagmeze, en religia universitato, antaŭ kies enirejo ni povis admiri belegan statuon prezentantan Mikelanĝelon, ni vizitis ekspozicion de preĝeja ilaro, poste ni iris al la preĝejo de Sankta Maŭricio. Post la vespermanĝo Miloslav Švaček vidigis al ni la projekciaĵojn pri la

ekumena kongreso en Vroclavo de la jaro 2009 kaj pri tiu en Trento (Cadine) en la jaro 2014.

Vendredon, la 17an, posttagmeze, ni vizitis la kvartalon de la kvar religiaj konfesioj kaj la rilatajn preĝejojn: la katolikan, la luteranan, la ortodoksan kaj la sinagogon. En la katolika preĝejo de Sankta Miĥaelo, la parokestro, pastro Aleksander Radecki prelegis, en pola lingvo, pri la liturgio de la muziko, kun simultana tradukado en esperanton farita de iu partoprenanto. Post la vespermanĝo, en la kunveneja salono, la fama gitaristo Patryk Filipowicz ĝojigis nin per koncerto.

Sabaton, la 18an, posttagmeze ni vizitis la preĝejon de Sankta Maria sur la sablo, poste ni aliris la botanikan ĝardenon kaj la grupo disiĝis por promeni ĝis la kvara horo, kiam la grupo rekuniĝis en la antikva preĝejo de Sanktaj Petro kaj Paŭlo, kie la luterana Pastoro Wolfram Rohloff celebris la Sanktan Manĝon. Post la vespermanĝo muzika kvaropo plenumis koncerton kun violono, violonĉelo kaj pianolo, intermetitan fojfoje de muzikaj pecoj kantataj de sopranulino kaj de du tenoroj. La belega vespero finiĝis per kanzonoj kantataj ĥore de la kunvenintoj kun akompano de la gitaro de Stefan Lepping.

La dimanĉo komenciĝis per matena sankta Meso, por la katolikoj, en la preĝejo de Sankta Marteno, kaj por la aliaj, en la preĝejo de la domo, laŭ ilia rito. Poste, en la salono, la kunvenintoj rekuniĝis lastfoje ĉirkaŭ la pastoro Rohloff, kiu legis kaj komentis salmojn kaj selektitajn pecojn de la Biblio.

Post la tagmanĝo sinsekvis la reciprokaj adiaŭoj kaj ekveturoj, ĉiu el ni kun belega memoro pri agrabla, neforgesebla restado en Vroclavo.

Norma Cescotti



Wrocław Bibliaj Tagoj

Tri italoj sur la ponto

Ununura malplaĉa noto:
dum du tagoj
ĝenananta malvarmego
kaj blovanta ventego
malpermesis al ni
atentan, agrablan
promenadon
tra la urbaj vidindaĵoj.

(Norma Cescotti)

NORME E QUOTE ASSOCIATIVE PER L'ANNO 2015

Associato ordinario <i>con Katolika Sento</i> (SO)	22,00 €
Associato giovane <i>con Katolika Sento</i> (SG)	11,00 €
Associato familiare <i>senza Katolika Sento</i> (SF)	11,00 €
Associato ordinario <i>con Espero Katolika</i> (SOE)	43,00 €
Associato sostenitore <i>senza Katolika Sento</i> (SS)	43,00 €
Associato sostenitore <i>con Espero Katolika</i> (SSE)	86,00 €
Solo abbonamento a <i>Katolika Sento</i> (AK)	10,00 €
Solo abbonamento a <i>Espero Katolika</i> (AE)	21,00 €

È associato giovane chi non ha superato i 25 anni. È associato familiare chi convive con altro associato. Specificare nella causale del versamento la categoria dell'associato, l'anno di nascita dei giovani, l'esatto indirizzo per il recapito del periodico K.S., la destinazione di eventuali offerte.

I gruppi locali con almeno 10 soci trattengono 2,10 € per l' associato ordinario e 1,05 per l'associato giovane o familiare.

I versamenti vanno fatti sul C.C. Postale n. 47127675 *Unione Esperantista Cattolica Italiana U.E.C.I*
codice IBAN: IT66 R076 0101 6000 0004 7127 675 Codice BIC/SWIFT: BPPIITRRXXX

Nota: Sull'etichetta/indirizzo con la quale avete ricevuto questa copia di *Katolika Sento* è indicata la sigla associativa e l'anno di scadenza dell'abbonamento.

COMITATO CENTRALE U.E.C.I.

Presidente: Giovanni DAMINELLI, via Lombardia 37, 20099 Sesto S.Giovanni (MI) – tel. 02.2621149 – katolika.sento@ueci.it (la residenza del presidente è anche sede dell'associazione)

Vice presidente: fra Pierluigi SVALDI, Belvedere San Francesco 1, 38122 Trento – tel. 0461.230392

Segretario/cassiere: Marco POLITI, Via Montemartini 4, 20139 Milano – tel. 02.5395237 – markpol00@Yahoo.it

Consulente culturale-religioso: Ida BOSSI, Viale Faenza, 26/7 20142 Milano

Responsabile dei congressi: Giovanni CONTI, via F.Filzi 51, 20032 Cormano (MI) – tel. 02.66301958

Responsabile culturale: Norma COVELLI CESCOTTI, via E.Fermi 29, 38100 Trento – tel. 0461.925210

Consulente informatico: Tiziana FOSSATI, via F.Filzi 30/A, 20035 Lissone (MB) - tel. 039.464942

Consulente editoriale: Carlo SARANDREA, Via di Porta Fabbrica 15, 00165 Roma – tel. 06.39638129

Assistente Ecclesiastico: mons. Giovanni BALCONI, p.zza Duomo, 16, 20122 Milano

Nota bene: Tutte le comunicazioni alla redazione di *Katolika Sento* vanno spedite al presidente UECl.

AMUZE

Ĉiuj ajn rajtas kontribui sendante al ni siajn humoraĵojn, kondiĉe ke ili estu en Esperanto.



(el www.giorba.it) - sendis Tiziana Fossati

Malfeliĉo

- Vi aperas malfeliĉa. Kio okazis al vi?
- Mia edzino forlasis min.
- Tio ne estas granda tragedio, iom post iom vi al kutimiĝos al pli libera vivo. Ne estu tiel malĝoja
- Sed ŝi revenis.

Geedza interparolo

- Se pliboniĝos niaj financoj, somere ni povos ferii ĉe la maro.
- Kaj se ili ne pliboniĝos?
- Vi restos hejme.

Ne-kredanto

- Patrino, mi ne volas edziniĝi kun li, ĉar li kredas, ke la infero ne ekzistas.
- Trankviliĝu. Kiam li estos mia bofilo, mi konvinkos lin pri tio.

Prikonsideroj

- La virinoj estas pli belaj ol la viroj!
- Tute nature!
- Ne, tute artefarite.

Dormemo

- Ellitiĝu, dormemulo! La suno jam de longe leviĝis... Ek! Ĉu vi ne scias, ke pleje riĉiĝas, kiu plej frue leviĝas.
- Panjo, mi volas ankoraŭ iomete dormi.
- Vidu Joĉjon: li eliris frumatene kaj trovis surstrate 100 eŭrojn.
- Tio signifas, ke la perdinto eliris pli frue.

Ĉe psikiatro

- Doktoro, mi kredas, ke mi estas hundo.
- Ekde kiam, vi kredas tion?
- De kiam mi estis hundido.

Inter industriestroj

- Kial vi maldungis Petron? Li ŝajnis al mi lerta vendisto.
- Jes sed li rakontis, ke mi estas stultulo.
- Tiukaze, vi bone faris: oni ne povas malkaŝi la sekretojn de la firmao.

Prelegoj pri filozofio

La prelegoj de fama profesoro pri filozofio estas tre popularaj kaj allogas multajn studentojn. Pro tio necesis disponigi al li pli grandan klasĉambron.

Tute neatendite okazis, ke en la unua prelego post la translokiĝo partoprenis neniu studento, kvankam la profesoro pendigis sur la pordo grandan panelon kun la skribo: "Miaj prelegoj pri filozofio, plu ne okazos en la salono 203, sed ĉi tie".

Psikanalizisto

- Vi suferas je grava kulpo-komplekso.
- Pro kio?
- Pro la 500 €, kiujn vi ŝuldas al mi, kaj kiujn ankoraŭ vi ne donis.

p://www.ueci.it/k_sento/ks_2015/

